



TTT-ejo de Eŭropa Komisiono : kelkaj rindindaj/plorindaj fuŝaĵoj

Lundo, la 26a de septembro 2011 estos "Eŭropa Tago de Lingvoj".

Iniciata en, 2001 de Konsilio de Eŭropo, ĝi estas nun ankaŭ promociita de Eŭropa Unio. Por festi la dekan datrevenon de tio, vi trovos ĉi-poste kelkajn fuŝaĵojn de la TTT-ejo de Eŭropa Komisiono pri lingvoj.

Tiuj elektitaj fuŝaĵoj montras ke estas granda diferenco inter la oficialaj vortoj (multlingvismo promociita) kaj la konstatebla vero (unulingvismo fakta). Tiu diskriminacio inter lingvoj montras ke la moto de Eŭropa Unio, "Unuiĝintaj en diverseco" estas malfacila viviĝi.

Ĉu ridi, ĉu plori ? Eŭropa Tago de Lingvoj estu festo, en kiu la diversaj popoloj eŭropaj ĝojiĝu pro ilia malsimileco. Ni elektu optimisman vidpunkton, dirante ke situacio povus esti pli malbona.

Pierre Dieumegard
sekretario de Francio EDE
pierre.dieumegard@free.fr
(33) 6 65 778 668

Artikolo 2a de la Lisbona Traktato :

La Unio ... respektas la riĉecon de ĝia diverseco kultura kaj lingva, kaj zorgas pri la konservo kaj disvolviĝo de la kultura heredaĵo eŭropa.

Artikolo 17a de la Lisbona Traktato :

La civitanoj de Eŭropa Unio ... havas, interalie, ... rajton sendi demandojn al institucioj kaj oficoj de la Unio per iu el la lingvoj de la traktatoj, kaj ricevi respondon en la sama lingvo.

La TTTejo <http://europa.eu> estas la portalo de Eŭropa Unio. La Eŭropa Komisiono, kiu estas la plenum-organon, havas TTT-ejon <http://ec.europa.eu>. En tiu TTT-ejo estas multaj sub-TTTejoj.

<http://ec.europa.eu/languages/> estas, kiel ĝia anglalingva nomo indikas, pri lingva politiko.

http://ec.europa.eu/education/languages/index_fr.htm estas la bonveniga paĝo de la parto pri lingvoj, en la sub-TTTejo pri edukado, franclingva. Oni devas doni la precizan nomon de celita dosiero.

Tie, la bildoj kaj TTT-adresoj estas franclingvaj. Malfeliĉe, tiu ekzemplo ankaŭ validas por aliaj lingvoj.


La misio de Prieduka Komisiono estas devigi "nurangla sistemo"

Ni rigardu la parton "Lingvoj" de la sub-TTTejo pri Edukado.:

http://ec.europa.eu/education/languages/at-a-glance/doc1458_fr.htm



Sur tiu paĝo franclingva, de la parto "Edukado", oni trovas frazojn pri lingvoj kaj multlingvismo. Tamen, kiam oni alklakas sur "Notre mission" (Nia misio), oni alvenas al anglalingva paĝo pri multlingvismo (http://ec.europa.eu/languages/index_en.htm).



Konklude : edukado pri lingvoj iru nur al angla lingvo. "Multlingvismo, pliriĉiganta defio" : eble, sed por riĉigi kiun ?

Por Eŭropa Komisiono, edukado kaj instruado ne gravas


http://ec.europa.eu/education/index_fr.htm estas franclingva paĝo pri edukado. Kvankam ĉiuj novaĵoj estas anglalingvaj, pro ĝia nomo [index_fr.htm](http://ec.europa.eu/education/index_fr.htm), oni pensu ke ĝi estas franclingva.

Se oni alklakas dekstre kaj malsupre por elekti alian lingvon, oni trovas nur anglan kaj germanan lingvojn kiel aliaj eblecoj.



Leĝoj de Eŭropa Unio deklaras klare ke ĉiuj gravaj dokumentoj estu en la oficialaj lingvoj de la Unio. Oni konkludu ke tiu sub-TTTejo pri edukado kaj instruado ne estas grava dokumento.

Tio estas pruvita per fakto ke, en tiu sub-TTTejo, ne estas paĝoj [index_pt.htm](http://ec.europa.eu/education/index_pt.htm), nek [index_es.htm](http://ec.europa.eu/education/index_es.htm), nek [index_pl](http://ec.europa.eu/education/index_pl.htm). Lingvoj ekster germana, angla au franca ne ekzistas kiel bonveniga paĝo pri Edukado kaj Instruado.



502 Bad Gateway

The server returned an invalid or incomplete response.

Konfirmo de la malgraveco de Edukado kaj Instruado : "Gravaj dokumentoj" nur anglalingvaj.

En tiu sub-TTTejo "Education", la paĝo http://ec.europa.eu/education/languages/eu-language-policy/index_fr.htm donas la ĝeneralan prilingvan politikon. Tiu oficialaj frazoj estas tre favoraj al multlingvismo :

Les langues sont une composante essentielle de ces activités. Les citoyens multilingues sont mieux armés pour tirer profit des possibilités en matière d'éducation offertes par une Europe intégrée. (Lingvoj estas ĉefa parto de tiuj agadoj. Multlingvaj civitanoj estas pli bone armitaj por profiti eblecojn pri edukado ofertaj per integrita Eŭropo)

La politique linguistique de l'Union européenne encourage le multilinguisme et vise à obtenir une situation dans laquelle chaque citoyen européen maîtriserait au moins deux langues étrangères en plus de sa langue maternelle. (La lingva politiko de Eŭropa Unio kuraĝigas multlingvismon, kaj celas situacion en kiu ĉiu eŭropa civitano kapablu almenaŭ du eksterlandajn lingvojn krom sia gepatra lingvo)

Sed, kiam oni alklakas "Documents importants" ("gravaj dokumentoj"), oni havas mesaĝon dirante ke tiu paĝo nur estas anglalingva.



The screenshot shows a web browser window with the URL http://ec.europa.eu/education/languages/key_docs/doc3413_fr.htm. The page header includes the European Commission logo and the word "Langues". The main content area displays a message: "Documents importants" followed by "This page is only available in English !". Below this message, it says "Click [here](#) to access." The page also features a language selector bar with various language codes (bg, cs, da, de, et, el, en, es, fr, it, lv, lt, hu, mt, nl, pl, pt, ro, sk, sl, fi, sv) and a "Share" button. A sidebar on the left contains links for "Qui sommes-nous?", "Notre commissaire", "Notre mission", "Que faisons nous?", "Politique linguistique de l'UE", and "Financement". The footer includes a "W3C WAI-A WCAG 1.0" logo.

Kiel deziri ke ĉiu baza civitano de Eŭropa Unio kapablu tri lingvojn, kiam Eŭropa Komisiono, kun multaj oficistoj, kapablas nur doni "gravajn dokumentojn" en la angla lingvo ?

Feliĉe, post kelkaj klakoj sur anglalingvaj paĝoj, oni alvenas al dokumentoj en diversaj lingvoj, sed tio estas malkuraĝiga !

Ne estas facile havi precizigojn, pri lingvoj uzitaj per Eŭropa Unio

Post la parto pri Edukado kaj Instruado, ni provu nun la parto pri lingvoj, en "http://ec.europa.eu/languages".

Oni povas legi ĝeneralizaĵojn pri oficialaj lingvoj, en kiuj estu ĉiuj oficialaj dokumentoj. Oni povas ankaŭ legi ke "Pro tempo kaj buĝeto, malmulte el labor-dokumentoj estas tradukitaj al ĉiuj lingvoj". Ni nun vidu ke oni ne povas facile trovi labor-dokumentojn tradukitaj eĉ en nur du aŭ tri lingvoj.

The screenshot shows a web browser window with the URL http://ec.europa.eu/languages/languages-of-europe/eu-languages_fr.htm. The page title is "Les langues officielles de l'UE". The content includes a sidebar with "e-newsletter", "European Language Quiz", and "Langues d'Europe". The main text explains that the EU has 23 official languages and that the first regulation in 1958 designated Dutch, French, German, and Italian as the first official languages. It also lists the two major rights of an official language: documents can be sent in that language, and EU regulations are published in that language. A right sidebar titled "En savoir plus" lists links to "Règlement n° 1 portant fixant du régime linguistique de la Communauté Economique Européenne", "Langues de l'UE en un clin d'œil", "La Direction générale de la traduction de la Commission européenne (DGT)", and "La Direction générale de l'interprétation de la Commission européenne (SCIC)".

Kiam oni klakas al "En savoir plus: Langues officielles et autres informations sur les pays européens " ("Scii pli : oficialaj lingvoj kaj aliaj informoj pri eŭropaj landoj"), oni havas erar-mesaĝon.

The screenshot shows a web browser window with the URL http://europa.eu/abc/european_countries/index_fr.htm. The page displays a large "502 Bad Gateway" error message. Below the error message, it says "The server returned an invalid or incomplete response."

Konklude : ne eblas scii pli pri oficialaj lingvoj. Sama problemo estas en la germana, la hispana, la itala, la nederlanda... kaj eĉ la angla.

Tie ankaŭ, malsupre kaj maldekstre, oni povas klaki sur "Documents importants" ("gravaj dokumentoj"), sed, same kiel en la parto "Edukado kaj Instruado", oni povas havi ilin nur post multaj paĝoj anglalingvaj.

Ĉu multlingvismo estas ĝenerala celo, aŭ ĉu ĝi estas detalo ?

En franclingva paĝo (http://ec.europa.eu/languages/index_fr.htm), kiam oni alklakas "Objectifs fixés" ("fiksitaĵoj"), oni havas paĝon pri graveco de lingvoj :

Eŭropa Komisiono kunlaboras kun estraroj de membro-Ŝtatoj, Eŭropa Parlamento, regionoj de Eŭropo kaj sociaj partneroj por :

- **doni al civitanoj eblecon lerni du lingvoj krom ilia gepatra lingvo, kaj tio, ek de la pli juna aĝo ;**
- **krei pli akceptemajn sociojn, kiu estu spacoj de dialogo inter komunumoj kaj unuopuloj ;**
- **plifortigi rolon de lingvoj en dungebleco kaj konkurenceco.**

Tiuj celoj estas la fondaĵo de la "politiko de multlingvismo" de EU.

Tiu rubriko prezentas agadojn de Komisiono en tiuj kampoj, kuraĝigante tiel membro-Ŝtatoj, lokaj aŭtoritatoj kaj sociaj partneroj preni decidojn laŭ ilia nivelo. En 2012, la Komisiono ekzamenos plenumitajn progresojn.

http://ec.europa.eu/languages/languages-of-europe/languages-in-specific-areas_fr.htm

Recherche | Contact | Archives | Avis juridique | français (fr)

Commission européenne
Langues

Commission européenne > Langues > Languages-of-europe > Objectifs fixés

DG Education et culture

Partager

bg cs da de et el en es fr it lv lt hu mt nl pl pt ro sk sl fi sv

Objectifs fixés

La Commission européenne collabore avec les gouvernements des États membres, le Parlement européen, les régions d'Europe et les partenaires sociaux afin de:

- donner aux citoyens la possibilité d'apprendre deux langues en plus de leur langue maternelle, et ce, dès le plus jeune âge;
- créer des sociétés plus accueillantes, qui soient des espaces de dialogue entre les communautés et les individus;
- renforcer le rôle des langues dans l'employabilité et la compétitivité.

Ces objectifs sont le fondement de la «politique de multilinguisme» de l'UE.

Cette rubrique présente les actions entreprises par la Commission dans ces domaines, encourageant ainsi les États membres, les autorités locales et les partenaires sociaux à prendre des mesures à leur niveau.

En 2012, la Commission passera en revue les progrès accomplis.

Tiu paĝo ekzistas en multaj lingvoj, kun proksimume samaj informoj, sed kun malsimila titolo. En iuj lingvoj, la titolo estas "Fiksitaĵoj", kaj tio signifas ke estas la ĝenerala celo. En aliaj lingvoj, la titolo estas "Lingvoj en specifaj kampoj", kaj tio signifas ekster la ĉefa kampo, do malpli grava. Ĉu Eŭropa Komisiono diras ke "krei pli akceptemajn sociojn, kiu estu spacoj de dialogo inter komunumoj kaj unuopuloj" estas ĝenerala celo de ĝia agado, aŭ nur specifa kampo, malpli grava ?

bg cs da de et el en es fr it lv lt hu mt nl pl pt ro sk sl fi sv

Languages in specific areas

The European Commission has joined forces with Member State governments, the European Parliament, the European regions and social partners in order to:

- Give citizens the chance of learning two languages in addition to their mother tongue from an early age.
- Create friendlier societies, where different communities and individuals engage in dialogue with one another.
- Strengthen the role of languages in improving employability and competitiveness.

bg cs da de et el en es fr it lv lt hu mt nl pl pt ro sk sl fi sv


Lenguas en ámbitos específicos

La Comisión Europea se ha aliado con los gobiernos de los Estados miembros, el Parlamento Europeo, las regiones europeas y los interlocutores sociales con el fin de:

- brindar a todos los ciudadanos la oportunidad de aprender dos lenguas, además de su lengua materna, desde una edad temprana
- crear sociedades más amigables, en las que comunidades e individuos dialoguen entre sí


Informo de la tago : la Eŭropa Tago de Lingvoj alvenas nenien !

Mardo, la 13a de septembro 2011 : sur la bonveniga paĝo de parto "Lingvoj" de Eŭropa Komisiono, ĵus aperis anonco pri la Eŭropa Tago de Lingvoj, en parto "Kio nova". Kiel kutime, tiu anonco estas anglalingve, kaj tio estas stranga maniero por promocii multlingvismo.



Estas du alklakeblaj partoj, je la komenco kaj je la fino de tiu anonco.

Ĉu klakante iu aŭ ĉu klakante la alia, oni alvenas ĉiam al anglalingva paĝo, kie ne estas anonco pri tiu Eŭropa Tago de Lingvoj.



Tiu paĝo pri aktualaĵoj ŝanĝiĝas rapide, kaj verŝajne tio ne videblos dum venontaj tagoj. Tamen tiu montras ke estas malfacile fari feston pri diverseco de lingvoj per TTTejo de Eŭropa Komisiono.